

釈尊とザメンホフ

Ŝakjamunio kaj Zamenhof

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

エスペラントのコミュニティを「宗教団体みたいで気持ち悪い」と評した人がいます。曰く、「集会の前に讃歌 (La Espero) を歌ったり、創始者のザメンホフを讃えたり、共通の言葉があれば世界は平和になると信じるなんておめでたい」そうです。

エスペラント界にはいろいろな人がいます。言語マニアもいれば、旅行が趣味の人、また平和運動の活動家など。ですから、仮にエスペラント界が宗教性を帯びているとしても、決して狂信的なわけではありません。むしろ人間の活動には、何らかの宗教性が伴うのは必然的だと思います。宗教とは、私たちがよりよく生きる上で何かに聖性を見出すことに他ならないわけで、無宗教と自認する多くの日本人でさえ、まったく聖観念と訣別してしまう人はごく少数です。

ただ、創始者ザメンホフのエスペラント界に占める位置については、いろいろな考え方があります。ザメンホフが大好きで、伝記を読みあさったり、その著作や演説を暗記するくらいに読んでいる人あり、逆にまったく関心が

Iu homo opiniis pri Esperanta komunumo, ke ĝi similas al religio. Li diris, "Kanti himnon (La Espero) ĉe la komenco de kunveno, laŭdi la kreinton Zamenhof, aŭ kredi ke komuna lingvo igas la mondon paca, jen estas tre naive."

En Esperantujo troviĝas diversaj homoj: lingvomanuloj, vojaĝamantoj, pacmovadanoj, k.t.p. Tial, eĉ se Esperantujo havas iomete da religieco, ĝi neniel estas fanatika. Prefere mi diru, ke homajn agadojn konsekvence akompanas ia religieco. Religio estas nenio alia ol la aprobo de sankteco en io por ke ni pli bone vivu. Eĉ japanoj, multaj el kiuj sin taksas senreligiaj, ne povas plene disiĝi de la ideo pri sankteco, escepte de tre malmultaj.

Nu, pri la pozicio, kiun la kreinto Zamenhof okupas en Esperantujo, estas diversaj opinioj kaj inklinoj. Kelkaj tre amas Zamenhof tiel, ke li legas multajn biografiojn pri li kaj liajn verkojn kaj paroladojn tiel entuziasme ĝis preskaŭ parkere, dume aliaj preskaŭ neniom interesiĝas pri li.

ない人もいます。ザメンホフが提唱した「人類人主義」あるいは「内在理念」についても、その評価は様々です。私はこれがエスペラント界の健全なすがただと思っています。

ザメンホフ自身はエスペラントを発表した時、「国際語は社会のものであって、著者はこれについてのすべての個人的権利を永久に放棄する」と書いて、エスペラントの発展をエスペランチスト大衆に委ねました。そして「マイストロ」と呼ばれることを嫌い、1913年の第8回世界大会を最後に、一切の公的地位から退くことを表明しました。思想や運動を創始者個人から切り離す、という姿勢は、今日でこそ違和感はありませんが、当時としては画期的だったのではないかと思います。エスペラントに先行した国際語ヴォラピュクの創始者シュライエルが専制君主的にふるまってヴォラピュク・アカデミーと対立したのとは対照的です。

ザメンホフ同様、自らの地位を特別視しなかったのが釈尊です。後世の私たち仏教徒は、尊称で彼のことを呼びますが、彼自身は個人崇拜を決して求めませんでした。ですから、その言行録は豊富に残されていますが、詳細な伝記資料は伝わっていません。自らについて語ることが少なかったからです。出家の動機について語っている

Ankaŭ pri “homaranismo” aŭ “interna ideo (de Esperanto)” troviĝas diversaj taksoj. Mi pensas, ke tio ĉi montras sanan estomanieron de Esperantujo.

Zamenhof mem, kiam li publikigis Esperanton, samtempe komisiis la estontan evoluon de la lingvo al esperantista publiko, skribinte: “Internacia lingvo [...] estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi.” Li ne ŝatis esti nomata “majstro”, kaj en la oka Universala Kongreso en 1913 li deklaris sian retiriĝon el ĉiuj oficilalaj postenoj. La sinteno disigi ideon kaj movadon de ĝia iniciatinto estas normala en la nuna tempo, sed estis epokfara en tiu tempo, mi pensas. Tio prezentas drastan kontraston kun Schleyer, aŭtoro de Volapuko, kiu estis unu el la internaciaj lingvoj antaŭ Esperanto, ĉar li sin tenis kvazaŭ despoto kaj kontraŭstaris foje ĝian akademion.

Same kiel Zamenhof, Ŝakjamunio ne speciale traktis sian pozicion nek honoris sin. Ni plipostaj budhanoj nomas lin per honora titolo, sed li mem neniam postulis kul-ton al sia personeco. Tial restas abundaj materialoj pri liaj agoj kaj paroloj, sed mankas tiuj pri lia vivo, ĉar li nur malofte parolis pri si mem, escepte pri sia motivo forlasi hejmon kaj eniri en la vivon de monaĥo.

のがせいぜいです。

イエスやムハンマドが神の子、最後の預言者、あるいは救済者とみなされているのとは対照的に、釈尊はふつうの人間であって特別の存在ではなかったのです。

釈尊がブッダあるいは阿羅漢として尊ばれているのは確かです。が、そのような地位は独占的なものではなく、事実、最初の説法によって五人が悟りに達した時、「この世に六人の聖者が生まれた」と、古い仏典は語っています。

「人に依らず法に依る」これは仏教の基本原理です。ですから、釈尊は亡くなる直前に、後継者を指名することをせず、弟子達もあえてそれを求めることをしませんでした。

「教団は、私に何を期待しているのか。私には説き残したことは何もない。教団の指導者であれば、事後のこととして何ごとか指示を残すだろうが、私はもともと教団の指導者だとは思っていない。そんな私に、いったい何を語ることがあろうか。他人に頼らず、自分自身を頼りとし、他のものを抛り所とせず、法を抛り所として、それぞれが修行に励みなさい」

ザメンホフと釈尊の共通点、それは個人の権威ではなく物事の道理そのものにそって生き活動することを大切にしたことです。

Dum Jesuo aŭ Mohamedo estas rigardata kiel la filo de Dio aŭ la lasta profeto aŭ la savanto, Ŝakjamunio estis ordinara homo kaj ne estis speciala ekzistaĵo.

Estas certe, ke Ŝakjamunio estas respektata kiel budho aŭ arahato, sed tiu ĉi pozicio ne estas monopola. Efektive, kiam la kvin monaĥoj atingis nirvanon per la unua prediko, "Tiamaniere estiĝis la ses arahatoj en tiu ĉi mondo," tiel rakontas malnova sutro.

Ne dependi de homo, sed dependi de darmo; jen tio estas la fundamenta principo de budhismo. Tial Ŝakjamunio intence ne nomumis iun sia heredanto aŭ gvidanton de samgo post sia morto. Ankaŭ liaj disĉiploj ne postulis tion.

"Kion la samgo esperas de mi? Nenio restas ne klarigita de mi. Se mi estus gvidanto de la samgo, mi restigos ian instrukcion por postaj okazoj. Sed mi ne pensas, ke mi estas gvidanto. Kion mi parolu pli? Ne dependu de aliaj homoj, sed de vi mem; ne dependu de aliaj objektoj, sed de darmo. Tiel vi mem strebu al daŭra praktiko."

La komuneco inter Zamenhof kaj Ŝakjamunio estas en tio, ke ambaŭ amis vivi kaj agadi sekvante ne individuan prestiĝon sed la racion per si mem.